

Termine

Die **wöchentliche Übungsstunde (KLERO)** findet statt donnerstags ab 19:45 Uhr in der „Evangelisch-lutherischen Kirchengemeinde Brake“, Kirchenstraße 24, 26919 Brake.

Unser nächstes **monatliches Treffen** findet statt am 01.03.2005 um 19:30 Uhr in Elsfleth, Gaststätte „Panorama“. Gäste sind willkommen.

Kiu volas partopreni, bonvolu informi nin.

Die **Jubiläumsfeier** anlässlich des zehnjährigen Bestehens unseres Vereins findet statt am 4. Juni 2005 in Rodenkirchen. / La **jubileofesto** pro la dekjara ekzisto de nia klubo okazos en Rodenkirchen la 4-an de Junio 2005.

Anmeldung zur Jubiläumsfeier / Aliĝo al la jubileofesto

(Sie können sich auch im Internet anmelden: / Vi povas ankaŭ aliĝi interrete: <http://www.esperanto.de/unterweser/dekegu.htm>)

Name: / Nomo:

Telefonnummer: / Telefonnumero:

E-Mail-Adresse: / Retpoŝtadreso:

Ich komme mit dem Zug. (Wir holen Sie am Bahnhof ab.) /

Mi alvenos per trajno. (Ni venos por akcepti vin ĉe la stacidomo.)

Ankunftszeit: / Alvenohoro: Um 11:00 Uhr / Je la 11:00 horo

Nach 11:00 Uhr, nämlich um ____ Uhr /

Post la 11:00 horo, pli precize je la ____ horo

Ausgefülltes Anmeldeformular bitte senden an: / Bonvole sendu la plenumitan aliĝilon al: Anne Höpken, Magdalenenstr. 27, 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837.

Impressum: Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.
 (<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Information und Redaktion: Anne Höpken, Magdalenenstr. 27, 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837
 Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368
 Andreas Kück, Tel.: 04702-5044
 Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Für Beiträge und Spenden:

Bankverbindung:

Landessparkasse zu Oldenburg; BLZ 28050100; Kontonummer 298174
 (Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 12

Feb. – Mai 05

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>

Dek-EGU: Zehn Jahre Esperanto-Gruppe Unterweser
Wir feiern am 4. Juni 2005 und laden ein: Seite 7



Dek-EGU: Dek jaroj da Esperanto-Gruppe Unterweser
Ni festos je la 4-a de Junio 2005 kaj invitas: Paĝo 7



Brigitte, Anne, Andreas kaj Alke en la Schillat-kaverno

La 1-a Rata Rendevuo en Hessisch Oldendorf

El nia grupo Unterweser Anne, Andreas kaj Alke partoprenis en la unua Rata Rendevuo, al kiu la Ratkaptisa Bando el Hameln afable invitis najbarajn kaj amikajn grupojn kaj esperantistojn. Niaj amikoj Brigitte kaj Stefan ankaŭ kunestis. Tagmeze ni renkontiĝis ĉe la stacidomo. Iom post iom la partoprenantoj alvenis aŭte aŭ trajne. Entute pli ol 30 gesamideanoj poste konkeris la restaŭraciojn de Hessisch Oldendorf. La plej multaj preferis ĉinajn manĝaĵojn por prepari la sentojn al la vespera prelego pri Ĉinio. Sed ankaŭ la itala frakcio estis reprezentita. Fortigite ni aŭtveturis en grupoj al la nur 15-minutfora Schillat-kaverno. La aŭto de Anne ne multe ŝatis la montetojn, sed devige sekvis la pli viglan veturilon de Stefan. Alveninte, ni pere de la lifto mergiĝis en alian mondon. En la profundo de la nur en 1992 malkovrita kaverno, gvidisto informis nin pri ĝia estiĝo. Ni multe lernis pri stalagmitoj (de malsupre supren), stalaktitoj (de supre malsupren), stalagmatoj (kuniĝintaj) kaj eĉ spagetoj. Oni povis admiri ŝtoniĝintajn amonitojn, marliliojn kaj aliajn strangajn vivestaĵojn. Estis ankaŭ eta ekspozicio kun trovaĵoj de la najbaraĵo: dentego de mamuto, ostoj kaj dentoj de dinosaŭrioj ktp. Fine ni vidis filmon pri apuda naturprotektita kaverno. Tiu protektema loko strikte estas malpermesata al la publiko. Sed danke al fascina, tri-dimensa elmonro estis kvazaŭ ni vere enestus. Realveninte al la taglumo, ni profitis de la bona vetero kaj promenadis al la ununura natura akvofalo de Malsupra Saksio. Post tiuj streĉadoj ni meritis refreŝigon. En la kamparanino-kafejo la elekto inter la multaj diversaj bonaspektaj tortoj ne estis facila. Sed ĉiu trovis sian preferitan kukon. Ni ĝuis kafon kaj teon kaj la babiladon kun novaj kaj malnovaj amikoj. Baldaŭ estis tempo por reveturi al la urbocentro por akurate atingi la prelegejon. Tie ni denove mergiĝis en alian mondon, nun en la ekzotikan Ĉinion. Unue Jozefa Krumme lasis nin partopreni en siaj aventuroj en Pekino. Grandan rolon ludis la fama kaj multflanka ĉina jupo. Sekvis la lumbildprelego de Reinhard Burgmann. Reinhard, ankoraŭ entuziasme pri Ĉinio kaj vestite kun bela ĉina jakso, montris al ni centojn da belegaj lumbildoj pri sia semajno en Pekino dum la UK kaj sia postkongresa vojaĝo en Ĉinio. Ni vidis interese konstruitajn lignajn palacojn, la placon de la ĉiela paco, la Mao-maŭzuleon kaj pomp-stratojn kun grandaj ruĝaj flagoj, kiuj salutis la esperantistojn en la urbego. La vizitoj de la Granda Muro kaj la argilaj soldatoj estis interalie la kulminoj de la vojaĝo. Sed Reinhard ankaŭ raportis pri kontrastoj: unuflanke pura naturo, aliaflanke forta medipolucio; aŭ unuflanke folkloro kaj aliaflanke karaoko. Post la fino de la prelego, li montris al ni kelkajn el siaj memorajoj el Ĉinio, ekz: monbiletojn, ĉinan pint-ĉapelon, silkpentaĵojn, kaligrafiojn, Esperanto-librojn. Ĉar ankaŭ kelkaj ne-esperantistoj aŭskultis la germanlingvan prelegon, tablo kun informiloj kaj varbiloj pri Esperanto estis preparita. Bona ideo por varbado. Ni nun preparis nin por la longa hejmvoyaĝo kaj adiaŭis. Koran dankon al Heinz Sprick kaj la Ratkaptista Bando por la distra kaj bonege organizita programo, al Reinhard Burgmann por la interesa prelego kaj al Jozefa Krumme. Ni vere ĝuis la tagon, kiu kiel fluge preterpasis. – Alke

Dek-EGU: Zehnjähriges Bestehen der Esperanto-Gruppe Unterweser Wir feiern und laden ein.

Im Jahre 1995 gründeten Alfred Dietrich und dreizehn weitere Gründungsmitglieder den Verein Esperanto-Gruppe Unterweser. Am **4. Juni 2005** feiern wir das in **Rodenkirchen** (S. 6, Abbildung 1) und laden ein. Wir treffen uns um **11:00 Uhr** in der Gäststätte „**Am Sporthafen**“, Strohauser Siel (Abbildung 2). Dort essen wir zu Mittag und können an einer Fahrt mit dem **Dielenschiff Hanni** (Abbildung 2) teilnehmen und die Unterweserregion erforschen. Am Nachmittag gibt es den Auftritt eines Shantychors, Kaffee und Kuchen. – Preis (Hanni, Mittagessen, Kuchen): 15 €; Anmeldung: S. 8.

Dek-EGU: Dek jaroj da ekzisto de la Esperanto-Gruppe Unterweser Ni festos kaj invitas

En la 1995-a jaro Alfred Dietrich kaj dek tri pliaj fondint-membroj fondis la klubon Esperanto-Grupo Subvisurgo. Je la **4-a de Junio 2005** ni tion festos en **Rodenkirchen** (paĝo 6, ilustraĵo 1) kaj invitas. Ni renkontiĝos je la **11:00 horo** ĉe la gastejo „**Am Sporthafen**“, Strohauser Siel (ilustraĵo 2). Tie ni tagmanĝos kaj povos partopreni ekskurson per la tabulŝipo Hanni (ilustraĵo 2) kaj esplori la sub-Wezer-regionon. La posttagmezon estos la prezento de “shanty”-ĥoro, kafo kaj kuko. – Kosto (Hanni, tagmanĝo, kuko): 15 €; aliĝo: paĝo 8.




Abbildung 2 / Ilustraĵo 2: (Fortsetzong von S. 6, Abbildung 1 / daŭrigo de paĝo 6, ilustraĵo 1) Zu den Deichen (ganz bis zum Deich durchfahren / traveturu tute ĝis la digo) -> (nach links in / maldekstren al) Strohauser Deich (nach wenigen Metern / post malmultaj metroj) -> Strohauser Siel (Deichüberfahrt / digtransveturejo) -> Treffpunkt (roter Stern) / renkontiĝejo (ruĝa stelo)

Enigmo

	1	2		4		6
1			7		8	
2				9		
3						
4			11			
5						
10				12		

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de Eŭropa lando.



Horizontale

1: aŭtosigno de Lübeck; **2:** pro iu aŭ pro io; **3:** mambesto, kies felo formas pikilaron [sen finaĵo]; **4:** led-rubande [ses literoj!]; **5:** saltanta insekto; **7:** mallongigo por la prefikso, kiu signifas miliardonon; **8:** aŭtosigno de Portugalio; **9:** la eternulo [sen finaĵo]; **10:** korea mon-unuo [sen finaĵo]; **12:** finaĵo de substantivo plus finaĵo de multe-nombro

Vertikale

1: je la tago antaŭ la nuna; **2:** arbo-speco; **4:** finaĵo de akuzativo; **6:** pingloarbo kun disaj pingloj [multe-nombro]; **7:** signo por tio, kie unu afero finiĝas kaj alia komenciĝas [sen finaĵo]; **8:** viro, kies ĉefcelo estas esti eleganta laŭ la modo; **9:** maljesi; **11:** aŭtosigno de Niĝerlando

Abbildung 1 / Ilustraĵo 1:
B212, Abfahrt / elveturejo Rodenkirchen
->Nordenhamer Straße ->
Friesenstrasse -> weiter
gemäß S. 7, Abbildung 2 /
plue laŭ paĝo 7, ilustraĵo 2

Das erste „Rata Rendezuo” („Ratten-Treffen”) in Hessisch Oldendorf

Von unserer Unterweser-Gruppe nahmen Anne, Andreas und Alke teil an dem ersten „Rata Rendezuo”, zu dem freundlicherweise die „Rattenfängerbande” aus Hameln benachbarte und befreundete Gruppen und Esperantisten einlud. Auch unsere Freunde Brigitte und Stefan waren dabei. Mittags trafen wir uns am Bahnhof. Nach und nach trafen die Teilnehmer mit dem Auto oder Zug ein. Insgesamt mehr als 30 Gleichgesinnte eroberten die Restaurants von Hessisch Oldendorf. Die meisten bevorzugten chinesische Gerichte, um die Sinne auf den Abendvortrag über China einzustimmen. Aber auch die italienische Fraktion war vertreten. Gestärkt fuhren wir in Gruppen mit dem Auto zu der 15 Minuten entfernten Schillat-Höhle. Annes Auto mochte die Hügel nicht sehr, aber es fuhr gezwungenermaßen Stefans lebhafterem Fahrzeug hinterher. Nach der Ankunft tauchten wir mit dem Fahrstuhl in eine andere Welt ein. In der Tiefe der erst 1992 entdeckten Höhle informierte uns ein Führer über ihre Entstehung. Wir lernten viel über Stalagmiten (von unten nach oben), Stalaktiten (von oben nach unten), Stalagmaten (verbundene) und sogar Spaghetti. Man konnte versteinerte Ammoniten, Seelilien und andere seltsame Lebewesen bewundern. Es gab auch eine kleine Ausstellung mit Fundstücken aus der Nachbarschaft: einen Mammut-Stoßzahn, Knochen und Zähne von Dinosauriern usw. Am Ende sahen wir einen Film über eine benachbarte Höhle, die unter Naturschutz steht. Aber dank einer faszinierenden dreidimensionalen Darstellung war es so, als ob wir wirklich drin wären. Nach der Rückkehr ans Tageslicht nutzten wir das gute Wetter und spazierten zu dem einzigen natürlichen Wasserfall Niedersachsens. Nach diesen Anstrengungen verdienten wir eine Erfrischung. Im Landfrauen-Café war die Auswahl unter vielen verschiedenen gut aussehenden Torten nicht einfach. Aber jeder fand seinen Lieblingskuchen. Wir genossen Kaffee und Tee und das Plaudern mit alten und neuen Freunden. Schon bald war es an der Zeit, ins Stadtzentrum zurückzukehren, um rechtzeitig bei den Vorträgen zu sein. Dort tauchten wir erneut in eine andere Welt ein, diesmal in das exotische China. Zunächst ließ uns Jozefa Krumme teilhaben an ihren Abenteuern in Peking. Eine wichtige Rolle spielte dabei ein berühmter und vielseitiger chinesischer Rock. Dann kam Reinhard Burgmanns Diavortrag. Reinhard, der immer noch begeistert von China war und eine hübsche chinesische Jacke trug, zeigte uns Hunderte von schönen Dias über seine Woche in Peking während des Esperanto-Weltkongresses und seiner nachfolgenden Reise durch China. Wir sahen interessant gebaute Holzpaläste, den Platz des himmlischen Friedens, das Mao-Mausoleum und Prunkstraßen mit großen roten Flaggen, die die Esperantisten in der Großstadt begrüßten. Die Besichtigungen der Großen Mauer und der Terracotta-Soldaten waren unter anderen die Höhepunkte seiner Reise. Aber Reinhard berichtete auch über Gegensätze: einerseits reine Natur, andererseits starke Umweltverschmutzung; oder einerseits Folklore und andererseits Karaoke. Nach dem Vortrag zeigte er uns einige seiner Erinnerungsstücke aus

China, z. B.: Geldscheine, einen chinesischen Spitzhut, Seidengemälde, Kalligraphien, Esperanto-Bücher. Da auch einige Nicht-Esperantisten dem in Deutsch gehaltenen Vortrag zuhörten, war auch ein Tisch mit Informations- und Werbematerial über Esperanto vorbereitet worden. Eine gute Idee für Werbung. Und wir machten uns bereit für die lange Heimfahrt und verabschiedeten uns. Herzlichen Dank an Heinz Sprick und die „Rattenfängerbande“ für das unterhaltsame und sehr gut organisierte Programm, an Reinhard Burgmann für den interessanten Vortrag und an Jozefa Krumme. Wir haben den Tag wirklich genossen, der wie im Fluge verging. – Alke

Libroprezento "Esperanto sen mitoj" de Ziko Marcus Sikosek

Per tiu ĉi libro, la aŭtoro pledas por pli sobra informado pri Esperanto. En sep ĉapitroj li priskribas Esperanton kaj aliajn planlingvojn, strategiojn kaj la informadon pri Esperanto, ties komunumon, subtenantojn kaj kreinton. Kadre de tio, Sikosek ankaŭ substrekas, kio laŭ li estas fantaziaĵoj ("mitoj"). Li montras, kial laŭ li, certaj asertoj estas kontraŭdiraj aŭ dubindaj. Ekzemple: Ĉu estas sencplene, se informantoj pri Esperanto asertas, ke ĝi estas la lingvo de amikeco kaj la angla estas la lingvo komerca? (La aŭtoro kritike demandas, ĉu ne ekzistas ankaŭ amikaj internaciaj kontaktoj pere de la angla, kiun uzas interalie Greenpeace, la NATO kaj eternaj Esperanto-komencantoj.) Ĉu frapfrazo kiel "Esperanto volas forigi la lingvan ĥaoson" fakte ne signifas, ke tiuj, kiuj tion asertas, nomas la ekziston de diversaj lingvoj "ĥaoso"? Ĉu Albert Einstein vere estis subtenanto de Esperanto? Ĉu estas unu miliono da homoj kun sufiĉe bona Esperanto-kono en la mondo, en kiu estas ensume ĉirkaŭ 5,5 miliardoj da homoj? Se jes, oni povus konkludi per facila uzo de la regulo de tri, ke en Kolonjo, kiu havas ĉirkaŭ unu milionon da loĝantoj, estas 182 homoj kun sufiĉe bona Esperanto-kono. (Devus esti eĉ pli: Kolonjo estas ne vilaĝo en la "Tria Mondo", sed grandurbo en la "Unua Mondo". Tial en Kolonjo verŝajne loĝas pli da tiaj homoj ol laŭ-averaĝe.) Fakte loĝas, laŭ Sikosek, maksimume tridek tiaj homoj en Kolonjo. – Tamen, laŭ iuj trovas sin ankaŭ maljusta kritiko en la libro: Mi konas la opinion de leginto, ke la aŭtoro malbone prezentas la Esperanto-movadon al la publiko, miksas verojn kaj neverojn kaj nomas "mitoj" eĉ favorajn prijuĝojn de Esperanto: la facila lerneblo de Esperanto kaj la per tiu atingebla plifaciligado de la lernado de pliaj fremdlingvoj. Do la leginto juĝu mem laŭ sia scio kaj siaj spertoj. Nu, en la libro estas ne nur kritiko, sed ankaŭ amaso da informoj kun font-indiko kaj proponoj pri tio, kiel informanto pri Esperanto ne fortimigas interesiĝanton pri Esperanto per nelertaj asertoj, sed racie informas tiun. Por tio, laŭ Sikosek, la informanto ne diru ion surbaze de optimismo aŭ supozo, sed apogu sin sur objektivaj faktoj. – Laŭ mi, "Esperanto sen mitoj" estas nepre leginda por gvidantoj kaj instruistoj de Esperanto-kursoj, estraranoj de Esperanto-asocioj kaj -klubo kaj ĉiu alia, kiu povus veni en la situacion informi pri Esperanto, ĉu aliajn, ĉu sin mem. – "Esperanto sen mitoj" havas 367 paĝojn, estas eldonata de la Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, Belgio, kaj kostas 30 €. – Andreas

Buchvorstellung „Esperanto sen mitoj“ („Esperanto ohne Mythen“) von Ziko Marcus Sikosek

Mit diesem Buch tritt der Verfasser für ein nüchterneres Informieren über Esperanto ein. In sieben Kapiteln beschreibt er Esperanto und andere Plansprachen, Strategien und das Informieren über Esperanto, dessen Gemeinde, Unterstützer und Erschaffer. Dabei hebt Sikosek auch hervor, was seiner Meinung nach Fantasiegebilde („Mythen“) sind. Er zeigt, warum seiner Meinung nach gewisse Behauptungen widersprüchlich oder zweifelhaft sind. Zum Beispiel: Ist es sinnvoll, wenn über Esperanto Informierende behaupten, dass es die Sprache der Freundschaft und Englisch die Sprache des Handels sei? (Der Verfasser fragt kritisch, ob es freundschaftliche internationale Kontakte nicht auch mittels des Englischen gibt, dessen sich u. a. Greenpeace, die NATO und ewige Esperanto-Anfänger bedienen.) Bedeutet ein Wahlspruch wie „Esperanto will das Sprachenchaos beseitigen“ eigentlich nicht, dass diejenigen, die das behaupten, die Existenz verschiedener Sprachen als „Chaos“ bezeichnen? War Albert Einstein wirklich ein Unterstützer von Esperanto? Gibt es eine Millionen Menschen mit ausreichend guter Esperanto-Kenntnis auf der Welt, in der insgesamt 5,5 Milliarden Menschen leben? Wenn ja, könnte man durch eine einfache Dreisatz-Anwendung folgern, dass es in Köln, das etwa eine Millionen Einwohner hat, 182 Menschen mit ausreichend guter Esperanto-Kenntnis gibt. (Es müssten sogar mehr sein: Köln ist kein Dorf in der „Dritten Welt“, sondern eine Großstadt in der „Ersten Welt“. Daher leben in Köln wahrscheinlich mehr solcher Menschen als nach dem Durchschnitt.) Tatsächlich leben laut Sikosek höchstens dreißig solcher Menschen in Köln. – Allerdings befindet sich nach Meinung mancher auch ungerechtfertigte Kritik in dem Buch: Ich kenne die Meinung eines Lesers, dass der Verfasser die Esperanto-Bewegung der Öffentlichkeit schlecht darstellt, Wahrheiten und Unwahrheiten vermischt und sogar günstige Bewertungen des Esperanto als „Mythen“ bezeichnet: die leichte Erlernbarkeit des Esperanto und die mittels Esperanto erreichbare Erleichterung des Erlernens weiterer Fremdsprachen. Der Leser urteile selbst aufgrund seines Wissens und seiner Erfahrungen. Nun gibt es aber nicht nur Kritik in dem Buch, sondern auch eine Fülle von Informationen mit Quellangaben und Vorschläge, wie ein über Esperanto Informierender einen sich für Esperanto Interessierenden nicht durch ungeschickte Behauptungen verscheucht, sondern diesen vernünftig informiert. Dazu soll der Informierende nicht etwas auf der Grundlage von Optimismus oder Vermutung sagen, sondern sich auf objektive Tatsachen stützen. – Meiner Meinung nach ist „Esperanto sen mitoj“ unbedingt lesenswert für Leiter und Lehrer von Esperanto-Kursen, Vorstandsangehörige von Esperanto-Verbänden und -Vereinen und jeden anderen, der in die Situation kommt, über Esperanto zu informieren, ob andere oder sich selbst. – „Esperanto sen mitoj“ hat 367 Seiten, wird von der Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, Belgien, herausgegeben und kostet 30 €. – Andreas